# Sesias hodia? la unua kunsido de la novaj parlamentaj komisionoj.



Havano, 4 jun (RHK) La dek konstantajkomisionoj de la nacia asembleo de la popola povo (Parlamento) de Kubo okazigas hodia? en la Kongresa Palaco de tiu ?i urbo, la unuan  kunsidon,  kie la ministerioj raportas pri sia agado.

Dum intensa labortago, la laborgrupoj konsistigitaj kaj aprobitaj pasintsabate, dum eksterordinara sesio de la 9-a le?ofaro, debatos pri la rezultoj de la anta?a periodo (2013-2018) kaj skizos la gvidliniojn por sia laboro dum la venontaj kvin jaroj.

La komisiono pri eksteraj rilatoj pritraktos la agadon de la koncerna ministerio, de la kuba instituto de amikeco al la popoloj kaj  la ministerio pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj; dum la komisiono pri aferoj konstituciaj kaj juraj, same faros kun la ?enerala prokurejo de la respubliko, la ministerio pri justico kaj la supera popola tribunalo.

La komisiono pri edukado, kulturo, scienco, teknologio kaj medio analizos la situacion de la rektoraj ministerioj de tiuj agadoj, kaj la komiono pri industrio, konstruado kaj energio pritraktos kun la respektivaj institucioj de tiuj agadkampoj.

Same faros ?iuj komisionoj pri atento al servo, pri agronutrado, pri sano kaj sporto, kaj anka? la komisiono pri ekonomiaj temoj; anka? sesios la komisiono pri atento al junularo, infanaro kaj egalrajteco de virinoj.

La dek konstantaj komisionoj de la parlamento kuba, estas formitaj de entute 380 el 605 deputitoj  kiuj estis elektitaj la pasintan 11-an de marto dum la ?eneralaj elektoj 2017-2018  por la venontaj kvin jaroj.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/163734-sesias-hodiau-la-unua-kunsido-de-la-novaj-parlamentaj-komisionoj

**Radio Habana Cuba**